nia voĉo

madrida esperanto-liceo novembro 2011

## VIZITO AL ALBACETO

La esperanta grupo de Albaceto (Albacete) invitas homojn esperantoparolantajn aŭ esperant-emajn je vizito al la urbo por la venonta sabato, la 5a de novembro. La celo estas duobla:

1- Montri al la vizitontoj la urbon Albacete kaj ĝian untan taŭgecon por gasti la venontan Hispanan Kongreson pri Esperanto en 2012

2- Interkonatiĝi inter la interesiĝantoj, studantoj kaj parolantoj de Esperanto en la regiono.

La grupo renkontiĝos je la 12a (ptm) en la trajnstacidomo de Albacete por poste iri al "La Zona" (centra parto de la urbo kun pluraj trinkejoj, manĝejoj kaj diboĉejoj), por fari rondiron tra la diversaj trinkejoj de la areo por iom trinki kaj manĝi. Poste, laŭ la emo de la ĉeestantaro, oni povos iri tagmanĝi en tiu kvartalo aŭ apude. Je la posttagmezo, kafumado.

La movado en la regiono Kastilio-Manĉo notinde progresas en la lastaj tempoj, kaj tre probable dum venontaj tagoj oni decidos en kiu parto de la regiono estos kunvokata la Hispana Kongreso.

En Toledo Pablo Busto instruas nuntempe kurson de Esperanto en la sidejo de la sindikato CNT. Informo pri la kurso aperis en diversaj regionaj komunikiloj.

## VIZITIS NIN

La 30-an de oktobro pasigis kelkajn horon en Madrido Raúl Martínez, el Reĝurbo (*Ciudad Real*) kaj kasisto de HEF. Grupo de amikoj akceptis lin kaj ĝuis bonan longan amuzan rendevuon.

## NOVA VERSIO DE LA TRADUKILO HISPANA-ESPERANTO DE APERTIUM

Hèctor Alòs anoncis ke novan version de la aŭtomata tradukilo de Apertium, de la hispana al Esperanto, oni povas uzi ĉe la adresoj http://apertium.saluton.dk kaj http://traduku.net.

Apertium estas programar-libera maŝintraduka platformo, dekomence celanta rilat-lingvajn parojn sed poste vastigita por pritrakti pli diverĝajn lingvajn parojn (kiel la angla-katalunan). Inter la paroj de lingvoj kiujn oni povas utiligi troviĝas tiuj de Esperanto kun la hispana, la kataluna, la franca kaj la angla.

Apertium povas kaj traduki platajn tekstojn kaj dokumentojn en diversaj formatoj kaj oni povas retumi kaj traduki per ĝi. Krome, ekzistas speciala utilaĵo por krei aŭ plibonigi artikolojn en Vikipedio: http://vikitraduko.saluton.dk:8080/vikitraduko/

La Apertium-arkitekturon evoluigas la Transducens-esplorgrupo ĉe Departmento de Lingvoj kaj Sistemoj Informadikaj de la Universitato de Alikanto kunlabore kun privataj firmaoj.

La nova versio enhavas multajn plibonigojn rilate al la antaŭa, kvankam ĝi estas evidente malperfekta (kiel ĉiuj aŭtomataj tradukiloj, cetere). Se iu hispan- aŭ ali-lingva esperantisto deziras kunlabori en la plibonigo de tiu ĉi tradukilo, aŭ krei tute novan, la evoluigantoj pretas akcepti aldonajn helpantojn. Kontaktu kun HEF por ricevi la precizajn adresojn.

## LA KURSO DE ESPERANTO HAVAS PROPRAN SPACON EN FACEBOOK

La kurso de Esperanto por komencantoj kiu nun disvolviĝas en Madrido, en la sidejo de MEL ĉiujn sabatojn matene, kreis propran spacon en Fejsbuko (*Facebook*). Kontaktu ĝin en http://www.facebook.com/cursosdeesperantoenmadrid

## DIVERSLOKE EN HISPANIO

Kiel ni anoncis en pasintaj numeroj, dum monato oktobro okazis la 19a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Malgrat de Mar, la 16a Andaluza Kongreso en Sevilo kaj la 35a Kataluna Kongreso en Barcelono.

Meze de novembro komenciĝos kurso por komencantoj en la Oficiala Lernejo pri Lingvoj en Vigo. Artikolo pri tiu ĉi urbo estas komence de novembro la "Artikolo de la Semajno" en la esperanta Vikipedio: http://eo.wikipedia.org/wiki/Vigo.

Joan Catalá prezentis en librovendejo Argot de Castellón sian novan hispanlingvan priesperantan libron *'Por qué tus hijos deberían comer más coliflores y aprender un poco de esperanto. Aproximación a una lengua auxiliar y apátrida'.*

*Kataluna Antologio* (1931) estas la plej (ĝis nun) ampleksa (pli ol 400 paĝoj) el la libroj haveblaj en la Bitoteko, la reta biblioteko iniciatita de Hispana Esperanto-Federacio: ĝi alireblas en la adreso http://www.esperanto.es:8080/jspui/handle/123456789/739

## MANIFESTACIO

Pasintan 15-an de oktobro okazis en diversaj urboj en la tuta mondo aro de manifestacioj sub la slogano "Unuiĝo por Tutmonda Ŝanĝo", laŭ iniciato de la nomata "indignula movado". En Madrido, kaj sub la ŝildo de SAT-en-Hispanio, dudeko de esperantistoj partoprenis la manifestacion kune, kun akompano de rubando en Esperanto kaj verda flago.

La Manifesto estas legebla en esperanta versio en la retejo de SATeH: http://www.nodo50.org/esperanto/artik108eo.htm

Fotojn eblas vidi en http://www.ipernity.com/doc/pedroesperanto/album/252677

## MADRIDA PROGRAMO

Kiel anoncite en pasinta numero, la unuan sabaton de la monato okazos kunveno en kafejo. Do, memoru: la 5an je la 5a vespere vi havas rendevuon en la supra etaĝo de centra kafejo "4D Copa y Café", strato Cruz 28, stratangule al placo Jacinto Benavente.

Krome, kiel ni anoncis la celo estas organizi ĉiumonate iun aranĝon por la tria semajnfino de ĉiu monato: ekskurson en la montaro, tagmanĝon... Pedro Hernández pretigos kalendaron por plenigi iom post iom tiujn triajn sabatojn. Sugestoj estas bonvenaj. Inter la proponoj jam troviĝas organizi gvidatan ekskurson dum unu aŭ du horoj, tra konkreta kvartaleto en la centro de la urbo, por konatigi vin kun ĉiuj detaloj, anekdotoj, legendoj, ligitaj al ĉiu strato.

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º. Krome, notu jenajn datojn por specialaj programoj:

- 14a de novembro, 18,30: Nederlando kaj vizito al Centra Oficejo de UEA; Manolo Parra.
- 21a de novembro, 18,30: "Aŭtuno en Nov-Jorko", fotografaĵoj komentitaj de Lupe.

En decembro, Zamenhof-tago, dum la semajnfino de la 17a kaj 18a de decembro.

Pri aliaj novaĵoj en Madrido kaj la mondo, atentu la diskonigojn en la retforumo pri Esperanto en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride.

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ saluton@wanadoo.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com